

Leciono #1 – Mi purigis la ĝardenon

Ligilo al la filmo: <https://youtu.be/a-mo6xHP27U>

Tasko 1: Aŭskultu la filmon kaj enmetu la mankajn vortojn

En tiu ĉi filmo, vi vidis min labori en ĝardeno. Mi _____ la pomojn, kiuj falis de la arbo. Antaŭ kelkaj tagoj, mi rikoltis _____. Entute, mi _____ pli ol ses kilogramojn da ili. Pri tiu _____ rikolto, mi jam faris alian filmon. Spektu ĝin! Eĉ pli da pomoj, tamen, jam falis sur la _____. Tiuj pomoj ne plu estis _____. La _____, tamen, tre ŝatis ilin! Mi devis rapide forigi la pomojn, ĉar mi ne volus, ke ili _____ vespojn. Komence, mi _____ la pomojn per _____. Sed kiel mi metu ilin en la ujon _____? Mi subite memoris, ke mi uzis _____ lastjare. Mi, do, rastis la pomojn kaj _____ ilin sur la tapiŝon. Poste mi _____ ilin en la ujon. La ujo estis tre _____. Mi komence provis _____ ĝin. Sed la _____ al la _____ estis tro granda. Mi tial levis la ujon kaj portis ĝin. Kelkfoje, mi ŝatas tiajn laborojn. Oni ja povas vidi la rezulton! Mi _____ la pomojn en la _____. Post duonhoro mi estis finita. Mi remetis la _____, fermis la pordon kaj mi sentis min _____, ke la ĝardeno refoje aspektas pura. Subite mi vidis kelkajn pomojn sur _____. Evidente mi forgesis _____ la branĉojn antaŭ ol mi komencis rasti! Mi skuis la branĉojn kaj _____ nur unu pomo falis de la arbo. Ĝi ne plu estis manĝebla. Eble mi _____ post kelkaj tagoj por kolekti la _____ pomojn. Tio estas ĉio por hodiaŭ. Ĉu vi jam rimarkis la taskojn por praktiki Esperanton sube? Mi nun volas _____ vin kaj mi deziras al vi bonan tagon!

Tasko 2: Ĉu vera aŭ falsa?

1. Mi rikoltis pli da pomoj ol estis sur la grundo. (V / F)
2. Insektoj ŝatis la pomojn, kiujn mi rikoltis. (V / F)
3. Komence mi ne sciis, kiel mi metu la pomojn en la ujon. (V / F)
4. Mi estis tro malforta por tiri la plenan ujon. (V / F)
5. Post duontagon, mi finlaboris kaj sentis min feliĉa. (V / F)
6. Mi laboris tute vane, ĉar multaj pomoj falis sur la grundon post kiam mi skuis la arbon. (V / F)
7. La pomo kiu falis de la arbo estis belaspekta kaj bongusta. (V / F)

Solvo de Tasko #1

En tiu ĉi filmo, vi vidos min labori en ĝardeno. Mi forigis la pomojn, kiuj falis de la arbo. Antaŭ kelkaj tagoj, mi rikoltis pomojn. Entute, mi rikoltis pli ol ses kilogramojn da ili. Pri tiu sukcesa rikolto, mi jam faris alian filmon. Spektu ĝin! Eĉ pli da pomoj, tamen, jam falis sur la grundon. Tiuj pomoj ne plu estas manĝeblaj. La vespoj, tamen, tre ŝatis ilin! Mi devis rapide forigi la pomojn, ĉar mi ne volis, ke ili allogu vespojn. Komence, mi kunigis la pomojn per rastilo. Sed kiel mi metu ilin en la ujon? Mi subite memoris, ke mi uzis tapiŝon lastjare. Mi, do, rastis la pomojn kaj amasigis ilin sur la tapiŝon. Poste mi verŝis ilin en ujon. La ujo estis tre peza. Mi komence provis tiri ĝin. Sed la distanco al la kompoŝtejo estis tro granda. Mi tial levis la ujon por porti ĝin. Kelkfoje, mi ŝatas tiajn laborojn. Oni ja povas vidi la rezulton! Mi elverŝis la pomojn en la kompostujon. Post duonhoro mi estis finita. Mi remetis la ilojn, fermis la pordon kaj mi sentis min feliĉa, ke la ĝardeno refoje aspektas pura. Subite mi vidis kelkajn pomojn sur branĉoj. Evidente mi forgesis skui la branĉojn antaŭ ol mi komencis rasti! Mi skuis la branĉojn kaj bonŝance nur unu pomo falis de la arbo. Ĝi ne plu estis manĝebla. Eble mi revenos post kelkaj tagoj por kolekti la ceterajn pomojn. Tio estas ĉio por hodiaŭ. Ĉu vi jam rimarkis la taskojn por praktiki Esperanton sube? Mi nun volas adiaŭi vin kaj mi deziras al vi bonan tagon!

Solvo de Tasko #2

1. F
2. F
3. V
4. V
5. F
6. F
7. F

Ligiloj

Ligilo al la jutuba kanalo: https://www.youtube.com/channel/UCLgkMgy1i9QaOzC_PM9AoRg

Vi povas mendi facile legeblajn librojn ĉi tie: <http://www.verdaolivo.com>

Ligilo al aliaj lecionoj: <http://www.verdaolivo.com/kursoj>